# La Riverego

Aŭtuno de 1998 | Esperanto-Societo Kebekia | N-ro 52a, Jaro 13a

# Un Café espéranto à Montréal

L'avant-dernier jour d'août a été cette année un jour spécial pour le mouvement espérantiste de Montréal et du Québec, grâce à l'ouverture du *Café espéranto,* avenue du Mont-Royal, en plein cœur du Plateau. Le plus épatant, c'est que le mouvement espérantiste n'est pour rien dans cette entreprise !

La propriétaire de ce nouveau café, situé au 250, avenue du Mont-Royal Est, au coin de l'avenue Laval, est Mme Julie Martel, et elle n'est ni espérantiste ni membre de notre Société. Néanmoins, elle sait assez bien ce qu'est l'espéranto, nous a elle-même contactés pour nous inviter à l'ouverture, et est bien entendu tout à fait prête à collaborer avec nous. Des dépliants sur l'espéranto sont même offerts à la clientèle.

Son idée, c'était d'offrir des mets et des boissons d'un peu partout au monde, et elle a cru bon choisir ce nom dans le but de montrer l'aspect international de son action. En plus du café, des boissons gazeuses et des boissons alcoolisées, elle n'offre pour le moment que des croissants et autres viennoiseries au déjeuner, et des sandwichs fort amusants et variés aux autres repas. Elle désire enraciner dans le Plateau la coutume de prendre régulièrement son déjeuner dans un café, avant d'aller au travail.

Le milieu des restaurants et cafés étant à Montréal très compétitif, nous croyons qu'il est de notre intérêt de prêter notre concours à Mme Martel, ne serait-ce que pour conserver cette merveilleuse publicité sur une artère de Montréal. Le mouvement espérantiste mondial a déjà été mis au courant de la nouvelle, et est invité à envoyer à l'entrepreneure des cartes postales représentant un café célèbre de la ville de l'envoyeur. Mme Martel pourra ainsi décorer un mur et souligner d'une autre manière l'internationalité de l'espéranto.

De plus, nous avons décidé d'y organiser régulièrement des rencontres informelles d'espérantistes montréalais. La première aura lieu le 18 septembre, puis de nouveau le 30, puis environ une fois par mois (voir le calendrier, à la dernière page). On pourra donc entendre l'espéranto dans le café de 42 places, et peut-être que Julie finira par apprendre ! Bien entendu, vous pouvez y aller tous les matins, si vous le désirez.

# Cinquième fin de semaine espérantiste internationale

Cette rencontre, la plus proche des rencontres internationales régulières, aura lieu, comme par les années passées, lors de la fin de semaine de l'Action de Grâce (pour les Américains, la fin de semaine du Columbus Day), du 10 au 12 octobre prochains, dans le centre de vacances Okemo, à Ludlow (Vermont).

Cette année, le programme sera moins *passif* que lors des rencontres précédentes. Il y aura moins de cours et de conférences, mais plus de groupes de discussions et d'ateliers. On vise ainsi à amener les participants à utiliser *concrètement* leur connaissance de l'espéranto.

La cotisation est de 25 USD (dollars américains), et de seulement 10 USD pour les étudiants, les sans-emplois et les retraités. Cependant, chaque participant doit veiller à se loger et à se nourrir.

Pour le logement, deux principales possibilités. On peut se loger sur le site même d'Okemo, qui offre des logements de style condo d'une, deux ou trois chambres. Il est possible d'épargner en partageant un logement

**suite...**

# Du novaj publikaj diskutejoj

Franko Luin

Je <esperanto.nu> aperis du novaj publikaj diskutejoj por esperantistoj. *Junulara forumo* celas unuavice junajn Esperantistojn, kiuj povas je ĝi pridiskuti libere kiajn ajn demandojn, kiuj interesas junajn homojn, kondiĉe ke la diskutoj pri ili okazas en Esperanto.

*TTT-Diskutejo* celas ĉiujn aliajn Esperantistojn kaj ankaŭ en ĉi tiu kazo la diskutoj povas okazi tute libere. Ĉiu vizitanto havas la eblecon komenci diskuton pri ŝatata temo, skribante mallongan enkondukon. La diskuteroj estas tuj legeblaj.

Ambaŭ diskutejoj utiligas unikodon ; la tekstoj ricevas ĝustan kodigon, se oni skribas la supersignitajn literojn per cx, gx ktp. La programoj, kiuj administras la diskutejojn, aŭtomate prizorgas la rekodigon.

*Junulara forumo* estas atingebla je www.esperanto.nu/junforumo/ ; *TTT-Diskutejo* je www.esperanto.nu/tttdisk/. [ El *Reta Bulteno de KEA* 4.13 ]

**...Cinquième fin de semaine...**

avec d'autres participants, même s'il est un peu tard pour cela.

L'autre possibilités est de se loger à l'Auberge de jeunesse du village de Ludlow. Une réservation de groupe a été faite.

De toutes manières, il est impératif de s'inscrire le plus tôt possible et de discuter à cette occasion du transport et du logement, afin de profiter des possibilités de regroupement. Contactez Normand Fleury, par téléphone au (514) 495-8442, par télécopieur au (514) 272-0151, ou par courriel à <esperanto@sympatico.ca>.

# En guise d'explication

Les lecteurs de *La Riverego* ont sans doute été surpris de voir leur bulletin perdre des pages ce printemps et cet été. En raison a était d'importants problèmes personnels, le rédacteur avait perdu des plumes et une bonne partie de son enthousiasme.

Vous êtes cependant toujours invités à contribuer à votre bulletin, même sans demande expresse de notre part...

## Kvazaŭ pravigo

La legantoj de *La Riverego* verŝajne miris pro la maldikeco de la lastaj du numeroj de tiu ĉi bulteno. La kialo estas gravaj personaj problemoj ĉe la redaktanto,.

Vi tamen sentu vin ĉiam bonvenaj kontribui al nia laboro per artikolo, eĉ ne petita.

# Senpagaj retadresoj

Franko Luin

Faites savoir à vos correspondants électroniques que vous appuyez l'espéranto en utilisant gratuitement une adresse du type <votrenom@esperanto.nu>.

Estas iom da informa kaj reklama valoro havi retadreson, kiu enhavas la vorton Esperanto. Nun ĉiu esperantisto, kiu tion deziras, povas aranĝi tion je esperanto.nu kaj la retadreso havos la formon <vianomo@esperanto.nu>. Oni aliras la paĝon http://esperanto.nu/retadreso/ kaj registras sin tie.

Oni povas registri plurajn retnomojn (propran, plian familianon, la klubon, bultenon, specialan aranĝon k.a.). Oni jam devas havi retadreson por utiligi la servon. Ĉiuj leteroj aperos nome en la ordinara leterkesto, sed videblos, kiun ili celas.

La servo estas tute senpaga. Ĝi estas uzebla de ĉiuj Esperantistoj kaj Esperanto-organizoj, kiuj volas havi mallongan Esperanto-adreson. Ĝi speciale taŭgas por kluboj kaj societoj, kiuj utiligas privatan retadreson de estrarano por la societa retpoŝto. Per alternativa retadreso oni povas « kaŝi » tion. [ El *Reta Bulteno de KEA* 4.13 ]

*La Riverego (Le fleuve)* est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 110 exemplaires sur papier recyclé. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 $.

*La Riverego* estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 110oble sur reuzpapero. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

**Échéance pour le prochain numéro / limdato por la venonta numero : 1998.12.01.**

Rédacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collaboré à ce numéro / kunlaboris al ĉi tiu numero : Suzanne Bolduc, Michel Clément, Normand Fleury kaj Zdravka Metz. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (président / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président / vicprezidanto), Jessy LaPointe (secrétaire-trésorier / sekretario-kasisto), Zdravka Metz kaj Yvon Roux.

**Esperanto-Societo Kebekia / Société québécoise d'espéranto**
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal Québec H2G 2R8
Répondeur et télécopieur / telefonrespondilo kaj telekopiilo: (514) 272-0151
esperanto@sympatico.ca
http://www3.sympatico.ca/esperanto

# Deux années dans la vie du mouvement espérantiste québécois

Michel Clément

Ces deux années correspondent à celles de la parution du magazine *La Lumo (L'espérantiste canadien)* publié entre le 1er janvier 1902 et février 1904. Les administrateurs A. P. Beauchemin et A. Rembert, ainsi que le rédacteur en chef et professeur de sciences J. B. Leymarie, réalisèrent, à cette époque, une édition trilingue (français, espéranto, anglais) et véritablement populaire de ce mensuel qui comprenait des nouvelles locales et internationales du mouvement, des récits et des contes, des débats, une page féminine, des illustrations, etc.

Comme s'il s'agissait d'une situation qui nous est familière, Léo Leymarie, dans son éditorial de février 1902, écrit ceci : « Nous faisons ici, en Canada, une lutte très dure ; nos efforts doivent être assez nombreux pour obtenir des résultats appréciables. » Il identifiait alors les deux principaux obstacles que rencontraient les espérantistes de cette époque, soit le déclin du volapük qui, à son avis, desservait l'idée d'une langue internationale, et aussi le désir de quelques-uns d'imposer à nouveau le latin comme langue savante et aussi comme langue-pont.

> Ils répondaient à leurs détracteurs « par la bouche de leurs canons ».

Nous y apprenons aussi que les rédacteurs lisaient *L'espérantiste* de L. de Beaufront, que l'on considérait *comme le bras droit de Zamenhof* ; on reproduisait fréquemment ses opinions ainsi que certains de ses articles. Ils aimaient aussi lire leurs détracteurs dans différents journaux du pays et du continent afin de leur « répondre par la bouche de leurs canons », ce qu'il firent avec audace et un acharnement de tous les instants. L'écrivain et militant coopératiste Albert Saint-Martin était d'ailleurs un des plus grands défenseurs de l'espéranto ; il donnait des cours d'espéranto au Club Bernier, rue Beaubien, tous les dimanches à quatre heures..., il écrivait des articles polémiques, donnait des conférences, etc. Ainsi, ce dynamisme amena certains membres actifs à fonder, le 7 avril 1902, le *Klubo Progreso* et peu après, à l'invitation de Mme Leymarie, on fonda le *Virina Klubo Progreso*. Pour donner davantage d'amplitude au travail de propagande, on créa en 1903 la *Société espérantiste américaine* qui avait pour but « de faire connaître, de propager en Amérique, la langue internationale espéranto ». L'abbé maskoutain F.X.I. Solis (1832-1903), considéré comme le premier espérantiste de ce pays, traduisait de nombreux textes dont ceux de l'écrivain français Louis Veuillot. Nous pouvons aussi y lire des contes de Maxim Gorki et de Tchékhov, traduits par des espéran-tistes européens, un dictionnaire pratique espéranto-français et espéranto-anglais, une grammaire avec exercices, une comédie dans le style d'Aristophane de Bruno Bruni, etc.

> *La Lumo* avait en 1902... 1710 lecteurs un peu partout au monde !

Le numéro de novembre 1902 nous en apprend beaucoup sur les conditions d'apprentissage de l'espéranto. Puisque tous les espérantistes montréalais et québécois avaient appris cette langue uniquement dans les livres, la prononciation faisait l'objet de doutes et de quelques polémiques. Afin d'en savoir plus et de résoudre le problème, des membres adressèrent un phonographe à Zamenhof pour qu'il puisse leur donner une leçon de prononciation ; ils expédièrent *l'instrument phonographique d'Edison* en Russie avec deux cylindres contenant la prononciation d'A. Saint-Martin et d'A. P. Beauchemin ; celle-ci fut d'ailleurs approuvée par le Maître qui prit la peine de répéter chaque lettre et de saluer le travail des espérantistes québécois.

Il est fascinant de découvrir, dans le numéro de décembre 1902, tout le réseau de relations internationales établi par les rédacteurs : 1710 lecteurs (1730 en 1903) provenaient de nombreux pays dont l'Allemagne, l'Angleterre, la Belgique, la France, la Chine, les États-Unis, etc. Les lecteurs français étaient particulièrement nombreux dont quelques-uns appartiennent à l'histoire du mou-

**suite...**

## Un Prix Nobel ?

Spomenka Štimec

Suite à l'initiative de l'écrivain Manuel de Seabra, trois organismes espérantistes (Esperantlingva Verkista Asocio, Esperanta PEN Centro et l'Internacia Esperanto-Muzeo de Vienne) ont présenté la candidature de l'écrivain espérantiste William Auld pour le Prix Nobel de littérature.

Le texte de la lettre de mise en candidature (en espéranto et en suédois) a été accepté lors de l'assemblée annuelle de Esperantlingva Verkista Asocio, à Montpellier. Elle sera accompagnée d'un dossier et d'une bibliographie des poèmes, essais et traductions de William Auld.

Quelles sont les chances qu'un écrivain espérantiste remporte le Prix Nobel de littérature ? Il faudra sans doute plusieurs années d'efforts pour que les instances décisionnelles, en Suède, en viennent à considérer la littérature espérantiste. [ Selon *Interredaktore*. Trad. *La Riverego* ]

# E$peranto

En Pologne, une rencontre espérantiste nouveau genre pendant laquelle les participants peuvent gagner de l'argent (fournie par des commanditaires) lors de quiz sur l'espéranto. Entrevue avec le président du club organisateur.

Intervjuo kun prezidanto de Olŝtina E-Klubo Sro Andrzej Gielert, fare de Marian Zdankowski.

— Kio estas FREŜO ?

— La plej simple — tio estas mallongigo kaj signifas « Frusomera Renkontiĝo Esperanta Ŝokanta Obstinulojn ». Olŝtinaj geesperantistoj ĝin organizas ĉiujare fine de junio. Venontjara FREŜO okazos jam por la sesa fojo kun dato 30.VI - 04.VII.99. Laŭ nia scio ĝi estas unika en Esperantujo...

— Ĉiu E-aranĝo estas unika...

— Vi pravas, sed diru, ĉu estas E-renkontiĝo dum kiu vi povas gajni monon ? Dum FREŜO — jes! Sufiĉas, ke vi iomete konas Esperanton, E-movadon kaj ĝian kulturon kaj historion. Por gajni belajn kaj riĉajn premiojn oni devas solvi ĉ. dek kvizojn — konkursaĵojn po 10 demandoj en ĉiu kvizo. Ĉiu partoprenanto de Granda Kvizo devas solvi ĉ. cent kvizerojn kaj la plej perfektulo gajnas ĉef-premion.

— Kiu gajnis ĉef-premiojn?

— Lastjare (1997), Sro Jerzy Konieczny, Polo, kiu prenis preskaŭ 1000 usonajn dolarojn kaj ĉi-jare (1998), Sino Dorota Burchardt, Polino, konkeris preskaŭ 600 USD... Oni devas aldoni, ke ĉi-jare dudek personoj ricevis mon-premiojn kaj ĉiuj « kvizanoj » ricevis malsamajn premiojn...

— Mi vidas, ke nur poloj gajnas...

— Preskaŭ. Stranga afero — alilandanoj aŭ ne bezonas monon aŭ ne kredas je tio, ke oni povas gajni monon dum E-renkontiĝo... Kiam ni startis kun nia FREŜO, ni pensis, ke ĝi estos interesa por rusoj kaj aliaj paradizanoj (el eks-komunismaj landoj)... por kiuj 1000-dolara monpremio estas grava sumo... evidentiĝis, ke ne... Krome, Poloj gajnas eble pro tio, ke ili estas simple perfektaj esperantistoj, ĉu ?

— Kial via aranĝo okazas fine de junio, fakte frusomere ?

— Pro du kialoj... unue ĉar preparoj al ĉi renkontiĝo estas temporabaj, ĝia organizado fine de junio efikas, ke tuta somerferio por organizantoj estas poste libera !... Due, se vi volas bone aranĝi vian propran somerferion, vi povas gajni monon dum FREŜO por via feriado... Por bona feriado — dum FREŜO-gajnado!...

— Kiu transdonas al vi monon ?

— Ĝenerale, bonaj rilatoj... jes, kun urbestro, kiu dekomence ĉiu-jare apogas nian aranĝon (ne nur morale)... kun regionestro, kiu antaŭ nelonge apogas nin... kun multaj olŝtinaj firmaoj, kiuj pli kaj pli multe da mono direktas al nia internacia renkontiĝo... [El *Interredaktore* ]

---

**...Deux années...**

vement espérantiste : Émile Boirac, Théo Cart, Carlo Bourlet, Gaston Moch, le général Sébert, Louis de Beaufront, Mme la comtesse de Noailles, Raoul Bricard. De Belgique, il y avait l'explorateur Charles Lemaire, de Suisse, le fondateur de l'UEA, Hector Hodler, de Russie, l'abbé Dombrovsky qui s'était opposé fermement au projet *homanariste* de Zamenhof ; d'ailleurs, ce dernier recevait *La Lumo* à Varsovie qui était, à l'époque, en territoire russe. La liste des lecteurs québécois et canadiens est particulièrement intéressante : ils provenaient principalement de Saint-Hyacinthe — où le libéral D.T. Bouchard était un membre fort actif — de Québec, et surtout de Montréal, où il y avait 244 lecteurs dont une très forte majorité était francophone.

On peut aussi lire dans *La Lumo* des articles animés sur une des grandes passions espérantistes que sont les débats linguistiques et les propositions de réformes : dans le numéro de septembre 1903, débute une série d'articles sur la suppression des majuscules, et en février, un article sur l'alphabet phonétique qui bénéficiera d'une réponse de Zamenhof. Ainsi, en février 1904, *La Lumo* annonce ce qui suit : « Vu la position dans laquelle nous nous trouvons de ne plus pouvoir imprimer l'espéranto avec les lettres accentuées, il nous a fallu accepter l'alphabet phonétique. D'après cet alphabet, nous remplacons ĉ par ch ; ĝ par dj ; ĥ par kh ; j par y ; ĵ par j ; ŝ par sh et ŭ par u. » Il est tout à fait surprenant de constater que près de 94 ans après cette décision, André Albault, dans le numéro 74 (janvier 1998) de *La Gazeto* propose une réforme qui s'apparente à l'application de *La Lumo* sauf pour trois lettres (ŭ/ù ; ĝ/j ; ĵ/jh).

# Torontano raportas

Pierre Savoie

Un participant torontois décrit le congrès nord-américain d'espéranto, qui a eu lieu à Montréal en juillet.

Dum bela veterо en la fino de julio, mi iris al la Nord-Amerika Esperanto-Kongreso en Montrealo (25ª ĝis 27ª de julio), kiel parto de kvaropo el Toronto. La Esperanto-Societo Kebekia gastigis la Kanadan Esperanto-Asocion kaj la usonan E-asocion : ELNA. Partoprenis kvindek usonanoj, kvardek kanadanoj kaj kelkaj eŭropanoj.

La ĉefaj eventoj estis bankedo sabatvespere, en kiu D^ro^ David Gaines prezentis la unuan movimenton de sia modern-klasika *Esperanto-Simfonio.* Dimanĉvespere, okazis vigla koncerto de la nederlanda/frisa popola kantgrupo *Kajto.*

Ankaŭ personoj prelegis pri siaj interesoj al aliaj E-parolantoj. Eĉ okazis prelegeto pri NIFOj (NeIdentigitaj Flugantaj Objektoj) en kiu ulo demandis, « Ĉu la ekster-teranoj intence disigis la homaron diverslingve ? » Ankaŭ estis prelegetoj pri itala katolika movado, artefaritaj lingvoj krom Esperanto, la dulcimero-muzikilo, gestlingvoj por surduloj, ktp. Ankaŭ estis eksursoj al la malnova kvartalo de Montrealo kaj al la Botanika Ĝardeno.

Entute, tio estis okazplena, fruktodona kongreso. Mi rekomendas al ĉiuj Esperantistoj, ke ili penu ĉeesti regionan aŭ nacian E-kongreson. [ El *La Torontano* n^ro^ 53 (aŭgusto 1998), pere de la *Reta Bulteno de K.E.A.* n^ro^ 4.16 ]

# Kongresanoj diskutis pri ponto inter nordo kaj sudo

La traktadon de la temo de la 83ª UK en Montpeliero, *Mediteraneo — ponto inter kulturoj,* enkondukis prelego de prof. Fabrizio Pennacchietti, konata esperantisto kaj profesoro pri ŝemida filologio en la Universitato de Torino. Ĝi donis tonon ankaŭ al la postaj specifaj prelegoj pri la temo.

Carmel Mallia parolis pri Malto, umbiliko de Mediteraneo, kaj Gerrit Berveling pri Mediteraneo en antikveco, kiam ĝi estis tre pli efika ponto ol ĝi estas nun. Jozef Ŝemer prilumis la nuntempajn rilatojn inter judoj kaj araboj en Israelo, kaj Antonio Marco Botella, malhelpita ĉeesti pro malsano, sendis skriban kontribuon pri la feliĉa periodo kiam etne kaj religie malsamaj homoj kunvivis pace en Al-Andalus.

Pluraj aliaj programeroj rilatis al la kongresa temo, tiel ke ĉiuj kongresanoj en unu momento au alia estis enplektitaj en la diskutoj. La konkludoj estas duspecaj : teoriaj kaj praktikaj.

El la teoria vidpunkto multaj agnoskas, ke la Esperanto-movado devas fari ion por konstrui ponton inter la nordo kaj la sudo de la mondo. Mediteraneo en tiu senco estis nur metaforo pri la tuta mondo. Ĝuste nuntempe la plej granda fendo dividas tiujn du mondopartojn, kaj la Esperanto-movado devas agi por pliigi la interkomprenon inter la du grandaj tendaroj.

El la praktika vidpunkto oni ne povas ne konstati ke la Esperanto-movado estas esence movado forta en la nordaj landoj, dum en la sudaj (mediteraneaj aŭ ne-mediteraneaj) landoj ĝia forto estas tre varia. Labori por konstrui unue la sudan bazon, sur kiu staros la ponto, estas nia prioritato. [ El *Gazetaraj komunikoj de UEA,* n^ro^ 10 ]

# Nord-Amerika Kongreso de Esperanto

Granda sukceso estis la Nord-Amerika Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Montrealo de la 24ª ĝis la 28ª de julio de 1998. Sub la komuna prezido de S^roj^ David Wolff (E-Ligo de Norda Ameriko — L.A. por Usono), Ciprian Jauca (Kanada E-Asocio) kaj Normand Fleury (E-Societo Kebekia), ĉefa organizanto, ĝi kunigis 115 homojn el kvar landoj (62 el Usono, 49 el Kanado, el kiuj 39 el Kebekio, kvar Nederlandanoj kaj unu Bulgaro).

Fakte, la ideo kunigi la tri asociojn (okazis samtempe la 46ª Jarkongreso de ELNA, la 16ª Jarkunveno de ESK kaj Jarkongreso de KEA) fontis el la neordinara ĉeesto de la E-muzikgrupo *Kajto,* kiu ĉi-somere turneis en Usono, proksime de Montrealo. Ĉar en nia kontinento ne kutimas vizito de kvazaŭ-profesiaj E-muzikgrupoj, oni decidis, ke indas organizi tian eventon, por ke kiel eble plej multaj homoj povu ĝui la koncerton.

Krom la koncerto de Kajto, laborkunsidoj kaj prelegoj pri diversaj aspektoj de la E-agado kaj rilataj temoj, la kongreso proponis la tradician bankedon, viziton de l' historia kvartalo de Montrealo kaj post-kongresan ekskurson al Kebeko. Tiuj vizitoj estis inter la plej ŝatitaj programeroj.

Dum la kongreso funkciis libroservo — ĝi amase vendis diskojn de Kajto ; parton de sia profito ĝi donacos al la Amerika Fondaĵo de UEA. [ Komunikaĵo de E.S.K. ]


**Virtuala Esperanto-Bibiloteko**

**www.esperanto.net/veb/**

La rapida vojo trovi E-materialon en TTT

# Ago-tago kaj homaj rajtoj

UEA denove alvokas al publika agado por diskonigi Esperanton dum la Internacia Ago-Tago, sabaton 3an de oktobro. Ĉiu rajtas mem elekti la plej taŭgan manieron por fari tion : per disdonado de informiloj, per ekspozicio au prelego, eĉ per manifestacio, aŭ alie. Ago-Tago estos bona okazo por publika aktivado por ĉiuj ; precipe por kluboj sed ankaŭ por izolitaj unuopuloj. Ĉiu povos tiam partopreni en komuna tutmonda agado.

Ĉar ĉi-jare oni festas la 50an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, UEA rekomendas ligi ĝin kun la aktivado en la Ago-Tago. Oni precipe diskonigu la gravecon de lingvo kiel fundamenta homa rajto. Taŭgaj koncizaj materialoj por prepari sin pri tiu temo estas :

- *Manifesto de Prago,* kies nacilingva(j) traduko(j) krome taŭgas ankaŭ por disdonado ;
- studmaterialo *Kio ni estas kaj kion ni celas,* kiu enhavas klarigan artikolon pri ĉiu el la sep tezoj de la Manifesto de Prago (prezo : 4,80 NLG) ;
- raporto pri la simpozio *Lingvo kaj homaj rajtoj,* organizita de UEA aŭspicie de la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj, kaj ĝiaj konkludoj kaj rekomendoj (vd. *Esperanto,* junio 1998, pĝ.102-103). [ El *Gazetaraj Komunikoj de UEA,* n-ro 13 ]

# Dring !

Les renseignements généraux de l'annuaire téléphonique de Budapest sont maintenant donnés en espéranto (en plus de l'allemand, de l'anglais, du français, de l'italien et du russe). Il serait utile d'envoyer des remerciements (en espéranto) à l'éditeur :

Magyar Telefonkönyvkiadó Kft.
Merkatika Direktoro
Baross u. 89
2040 Budaörs
Hongrie

[ *Selon Interredaktore* ; traduction *La Riverego* ]

# Transition

Sylvain Auclair

L'une des quelques difficultés de l'espéranto, quand on veut l'utiliser de manière correcte, réside dans la transitivité des verbes.

Qu'est-ce que c'est que ça ? Un verbe est dit *transitif* quand il peut (ou parfois doit) avoir un complément d'objet direct. Par exemple, *manger* est un verbe transitif, parce qu'on peut manger *quelque chose.* Au contraire, le verbe *dormir* est intransitif, parce qu'on ne peut pas dormir quoi que ce soit. Pour compliquer les choses, certains verbes sont parfois transitifs, parfois intransitifs, comme le verbe *pendre,* qui peut signifier *être suspendu* (intr.) ou bien *accrocher* (trans.). Dans ces cas, en espéranto, par souci de précision et de clarté, on devra distinguer les deux usages en employant deux formes différentes, à savoir *pendi* et *pendigi.*

Comment savoir si, en espéranto, un verbe donné est transitif ou non ? Il n'y a qu'un moyen, aller voir dans le dictionnaire. Par exemple, les verbes *movi* ou *ruli* sont transitifs, et veulent dire *faire bouger* et *faire rouler.* Au contraire, des verbes comme *kuŝi, situi* ou *promeni* sont intransitifs et ne signifient pas, comme on serait tenter de le croire, *coucher, situer* et *promener,* mais plutôt *être couché, être situé* (ou *se situer*) et *se promener.*

Comme on a pu le voir avec l'exemple de *pendi/pendigi,* les suffixes ont ici aussi leur rôle à jouer. Le suffixe *-iĝ-* rend un verbe intransitif, comme dans *moviĝi* (bouger, se mouvoir) et *ruliĝi* (rouler, se déplacer en tournant sur soi-même) ; au contraire, le suffixe *-ig-* termine un verbe transitif. Par exemple, *kuŝigi* (coucher, mettre au lit), *situigi* (situer, placer) ou *promenigi* (promener, son chien, par exemple).

Conclusion : même si les mots espéranto ressemblent souvent à ceux de notre langue, il faut prendre garde à les utiliser correctement, et cette manière peut différer de l'usage du français. Tournons notre langue (ainsi que les pages du dictionnaire) sept fois avant de parler…

# Nia esperantista hundo

Jessy LaPointe

Un chien qui n'obéit qu'en espéranto !

En junio, Jolie, la hundino de Normand Fleury, naskis tri beletajn idojn. Komence de aŭgusto, mi aĉetis unu el la tri beboj, kaj mi donis ĝin al mia patrino okaze de ŝia datreveno. La vigla bruna harbulo feliĉigis mian patrinon.

Mi rakontis al ŝi, ke la filino de Normand komencis nomi la hundidinon Bela. Ŝi ŝatis la proponon kaj decidis konservi al Bela tiun nomon. Sed mia patrino ne devis lerni nur tiun esperantan vorton : la hundido venis nur kiam ni ekkriis al ĝi « Venu ! », sed neniam obeis al « *Viens !* ». La hundo ankaŭ komprenis nur « Ne ! » (aŭ ŝajnigis ne kompreni). La vorto « Non ! » restis sen efiko.

Ni instruis aliajn ordonvortojn al Bela uzante la francan, sed mia patrino daŭre devas klarigi al la vizitantoj kial ŝi devas paroli esperante al sia hundo…

# Des questions !

Y a-t-il quelque chose qui vous chicote dans la grammaire ou le vocabulaire de l'espéranto ? Si c'est le cas, vous n'êtes sans doute pas seul. Alors, posez-nous des questions (vous trouverez nos coordonnées dans le bloc technique, au bas de la page deux) et nous tenterons de répondre à vos problèmes, réglant ainsi le nôtre, celui du manque d'inspiration (parfois !).

# Raporto pri la financoj

Jessy LaPointe, sekretario-kasisto

Quelques données sur notre situation financière.

La Esperanto-Societo Kebekia denove, ĉi-jare, ricevis malpli da mono el la kotizantoj. La kotizoj de 1996-1997 alportis 767 $ al la Societo, sed nur 390 $ de junio 1997 ĝis majo 1998. La sumo de rimedoj por 1997-1998 egalas do nur al 405 $, kontraŭ 934 $ por 1996-1997.

Feliĉe, la ordinaraj aktivaĵoj de la ESK kostis malpli ol lastan jaron : la Societo elspezis nur 981 $ ĉi-jare, kontraŭ 1030 $ pasintan jaron. Restis tamen nur 2004 $ en la ĉek-konto de la Societo je la fino de la financa jaro, kontraŭ 2028 $ lastjare.

La venonta jaro estos eĉ pli malfacila por ESK, je financa vidpunkto, ĉar ĝi fine forkonsumis la monon de la Provizo de la Montreala Klubo.

Tamen, ESK havas pli da aktivoj ol lastjare kaj ĝia financa situacio ne (jam) estas koŝmara.

# Precizigo

Ni ricevis plurajn demandojn pro la artikolo pri la eksigo de Martin Lavallée, legebla en la franca en paĝo 5a de l' ĵusa numero de *La Riverego*. Ni memorigu, ke ni malkovris ke Sro Lavallée propagandas la lingvon Ido en franclingvaj ttt-paĝoj, asertante ke ĝi estas plibonigita Esperanto. Plej malbone, eblas atingi tiujn paĝojn serĉante pri Esperanto, ekzemple per *La toile du Québec,* kio portas konfuzon en la menson de la informpetintoj kaj ebligas al Ido uzi la famon de Esperanto por sia disvastiĝo.

Kvankam ni ĝis nun neniam sentis la bezonon eksigi membron, la statuto de la Esperanto-Societo Kebekia antaŭvidis la okazon. La paragrafoj 7.1 kaj 7.2 tekstas jene : *La estraro rajtas eksigi membron kiu agas kontraŭ la celo de la societo. Ĉiu eksiga decido postulas la subtenon de almenaŭ du trionoj de la estraranoj.* La 4a paragrafo aldonas ke *la eksigito rajtas remembriĝi laŭ decido de la ĝenerala kunveno.* La celon de la Societo donas la paragrafo 3.1 : *La celo de la societo estas la progresigo de la internacia lingvo en la tuta mondo, ĉefe en Kebekio.* Kompreneble, temas pri la internacia lingvo Esperanto, kiel precizigite en la paragrafo 2.1. La estraro sekve sentas sin tute prava rilate sian decidon eksigi Sron Lavallée.

Oni ja povus kontraŭaserti, ke Sro Lavallée ne estis membro dum oni voĉdonis eksigi lin, ne repaginte sian kotizon ; laŭ tio, oni ne povus eksigi lin. Nu, se oni volas... En tiu kazo, estus tamen certe, ke la estraro eksigus lin tuj post lia remembriĝo.

# Nouveaux cours d'espéranto

Les lundis à 19 h se tiendra un cours pour ceux qui ont déjà une base de la langue. Zdravka Metz guidera ce groupe de conversation. Le premier cours aura lieu le 21 septembre.

Les jeudis à la même heure, un cours pour débutants sera offert pour une durée de 12 semaines, à partir du 24 septembre. Normand Fleury enseignera aux débutants les bases de la langue et présentera également le mouvement espérantiste international.

Les cours se tiendront au 6358-A, rue de Bordeaux, à Montréal, métro Beaubien (autobus 18) ou Fabre (autobus 45).

# Mise au point

De nombreux commentaires ont été émis suite à l'article concernant l'exclusion de Martin Lavallée de la Société québécoise d'espéranto, publié à la page 5 du dernier numéro de *La Riverego*. Selon les articles 7.1 et 7.2 des statuts de la S.Q.E., *le Conseil d'administration peut exclure de la Société tout membre qui contrevient à l'objet de celle-ci. Aucune exclusion ne peut être prononcée si elle ne recueille au moins les deux tiers des voix des administrateurs.* L'article 7.4 mentionne pour sa part que *tout membre exclu peut réintégrer la Société s'il en est ainsi statué par une assemblée générale.*

L'objet de notre Société, quant à lui, est mentionné à l'article 3.1 : *Le but de la Société est de faire progresser la langue internationale dans le monde entier, et principalement au Québec.* Évidemment, il s'agit de la langue internationale *espéranto,* telle que mentionnée à l'article 2.1.

Il est selon le Conseil évident que la propagande pour l'Ido, surtout si on compare favorablement cette langue à l'espéranto et que des personnes à la recherche d'information sur l'espéranto sont dirigées vers des sites Web consacrés à ce « concurrent », contrevient au progrès du mouvement espérantiste.

Par ailleurs, on pourrait objecter que Martin Lavallée n'était plus membre en règle lors de son exclusion, puisque sa cotisation n'avait pas été renouvelée, et qu'il était par conséquent impossible de l'exclure. Si l'on veut. Ce qui est certain, alors, c'est que le Conseil l'exclurait dès qu'il aurait de nouveau réglé sa cotisation.

Pour terminer, rappelons que cette exclusion constitue une première dans l'histoire de notre Société.

# Kalendaro de venontaj okazaĵoj

4ª ĝis 6ª de **septembro**. Gastronomia semajnfino (**ĉokolado**), en Bulonjo-ĉe-Maro (Francio).

18ª de septembro. Vizito de **Café espéranto** kaj vagado **laŭ strato Saint-Denis**. Renkontiĝo je la 19h, angule de l' strato S^t-Denis kaj de la avenuo du Mont-Royal.

30ª de septembro. **Kluba kunveno** ĉe *Café espéranto* (250, av. du Mont-Royal Est). 19h30.

3ª de **oktobro**. Internacia **Ago-Tago**.

10ª ĝis 12ª de oktobro. OKEMO, en Ludlow (Vermonto, Usono)

10ª ĝis 12ª de oktobro. Esperanto **Koruso-Staĝo**, en Montferrier (Francio).

11ª ĝis 18ª de oktobro. **TEJO-Seminario**, pri *Lingvaj rajtoj — lingvopolitiko*. En Budapeŝto (Hungario)

14ª de oktobro. **Kluba kunveno** ĉe *Café espéranto*. 19h30.

23ª de oktobro. **Kluba renkontiĝo**, ĉe Ivano kaj Daniela, 7122, rue Fabre, app. 1 (metrostacio Fabre), (514) 727-8758. Temo : *sensukeraj desertoj*.

30ª de oktobro ĝis 5ª de **novembro**. 8ª Internacia Esperanto-Kongreso, en San-Francisko (Usono).

13ª de novembro. **Kluba renkontiĝo,** ĉe *Café espéranto*, 19h30.

20ª de novembro. **Kluba renkontiĝo,** ĉe Patriko, 1043, av. Pratt, Outremont (metrostacio Outremont), (514) 341-3449. Temo : *kiel iĝi riĉa*.

29ª de novembro. **Malferma tago** en la CO de UEA. Roterdamo (Nederlando).

4ª ĝis 6ª de **decembro**. Kuriozaĵoj el la **vivo de Zamenhof**. En Rijeka (Kroatio).

12ª de decembro. Zamenhofa Festo. **Komuna manĝo** ĉe la Montreala Esperanto-Domo (6358-A, rue de Bordeaux), 18h.

15ª de decembro. **Kluba kunveno** ĉe *Café espéranto*. 19h30.

27ª de decembro ĝis 3ª de **januaro de 1999**. 42ª **Internacia Seminario**, en Kassel (Germanio). Temo : *Dependeco : faktoj, sekvoj, solvoj*.

27ª de decembro ĝis 3ª de januaro. **Internacia Festivalo** por mezaĝuloj, en Niedenstein (Germanio).

27ª de decembro ĝis 3ª de januaro. 4ª **Tut-Amerika** Kongreso de Esperanto, en Bogoto (Kolombio).

31ª de **marto** ĝis 6ª de **aprilo**. Internacia **Junulara Festivalo**, en Rimini (Italio).

13ª ĝis 16ª de **majo**. **Printempa Renkontiĝo**, en Eijsden/Mesch (Nederlando). Temo : *Eŭroregionoj*.

30ª de **junio** ĝis 4ª de **julio**. **FREŜO** : Frusomera renkontiĝo esperantista ŝokanta obstinulojn, en Pollando.

31ª de julio ĝis 7ª de **aŭgusto**. 84ª **Universala Kongreso**, en Berlino (Germanio).

9ª ĝis 16ª de aŭgusto. 55ª Internacia **Junulara Kongreso**, en Zánka (Hungario).

26ª ĝis 28ª de aŭgusto. Seminario. ***Koboldoj en folkloro.*** En Iisalmi (Finnlando).

11ª ĝis 18ª de **julio de 2000.** 85ª Universala Kongreso, en Tel-Avivo (Israelo).

**Somero 2001.** Universala Kongreso, en Zagrebo (Kroatio).

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj : (514) 272-0151.

## Forumo de la Esperanto-komunumo

# Komuna strebo al kunlaboro

La unuan fojon, almenaŭ en la historio de la Esperanto-movado post la dua mondmilito, okazis kunveno en kiu estis reprezentataj ĉiuj signifaj partoj de la Esperanto-komunumo. En la unua kunsido de la Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo en lundo 3ªⁿ de aŭgusto, ĉeestis kvindeko da asocioj grandaj (UEA, SAT, TEJO, ILEI, IFEF, AIS), mezgrandaj (asocioj de katolikoj, sciencistoj, kuracistoj, etnistoj, bahaanoj, komunistoj, ktp.) kaj malgrandaj (lokaj klerigaj centroj k.a. asocioj).

Enkonduke prelegis Humphrey Tonkin, pri la konceptoj *movado, komunumo* kaj *civito,* kaj Yves Peyraut, prezidanto de SAT, pri la nuntempaj sociaj taskoj de Esperanto-organizaĵoj. Skribe kontribuis Aleksander Korĵenkov, kiu pro personaj kialoj ne povis ĉeesti. La enkonduka prelego de Korĵenkov, titolita *Esperanto post la jaro 2000*, jam aperis kiel la unua numero de la nova serio de *Diskutkajeroj* de UEA. Ankaŭ la prelegoj de Tonkin kaj Peyraut estos publikigitaj.

La ĉeestantaj asocioj prezentis sin kaj sian agadon. Sekvis vigla debato, kiu devigis la organizantojn plilongigi la renkontiĝon je unu horo.

La ĉefa rezulto de la kunveno estas la montro de granda preteco je du-flanka aŭ plurflanka kunlaboro inter la partoprenintoj, kio jam dum la venonta laborjaro devus doni siajn fruktojn en la formo de kunlaboraj aranĝoj inter fakaj asocioj. Oni krome decidis daŭrigi la ekziston de la Forumo en la nuna neburokrata maniero (prezidantoj aŭ estraroj rilatas inter si) kaj pritaksi la rezultojn dum la venonta UK en Berlino. [ El *Gazetaraj komunikoj de UEA*, n^ro 10 ]